

& La serpento longa:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 812 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Kukoletto (1986) laŭ norvega melodio de &"Drako Longa". Klarigo (*): '13 Kvel = kiel.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

aa;Do /LAALALA TIDo ReRe Do; FaFa MiDo LA; LaLa LaLa TiLaSo LaLa; TiTi LaSoFi Mi;

(#Rekantaĵo: SoSo FiMiRe Mi Do;Re MiFiSo FiRe Mi; dodo LaSo MiMi SoTi La La La)

)×28)+

(&Strofoj:

'1 Ĉu /volas vi odon aŭdi nun ; Ĉu ĉendancos vi ; Temas pri timiga frenezo ; fraŭda propozici'

(×:; **Herboj kreskas en kampoj ; Flarindas la florodor' ; Gaju pro printempa rubekola ĥor'!**)

'2 Venis insista sciencisto, ; serioza hom', ; havis konon pri la neŭtrono, ; nukleofendebla atom'.

'3 Efika pli ol uranio ; estas plutoni'. ; Miru nun: unua sub suno ; nova ma2teri'!

'4 Inventis Usono sub stadiono ; novaĵon el infer'. ; Ĝia pura ra2diado ; regnas ja2m sur ter'.

'5 Al japanoj uragano ; venis trans ocean'. ; Sed estis jena ja fenomeno, ; brilega fajroban'.

'6 Homoj brulis, ombre makulis ; sur malantaŭa mur'. ; Ankoraŭ drivas radioaktivaj ; eroj en la natur'.

'7 Venis poste vivokosta ; dua forviŝa bomb'. ; Urboj tutaj iĝis tuj mutaj, ; taŭgis nu2r por tomb'.

'8 Post milito moninvito: ; "Atomojn por la pac'! ; Elektrofilia plu2tonio ; ne plu fariĝos minac'."

'9 Reaktoroj provizoraj, ; radia paradigm', ; utilaj staras dekojn da jaroj, ; posteco estas enigm'.

'10 Pri la rubo restas dubo: ; kiel gardu ĝin? ; Ĉu gargaro en ĝu2sta maro ; aŭ sigelo en sa2la min'?

'11 Problemo estas, ke ĝi restos ; perfida tradici': ; Post fino de nia civilizacio ; plu radiados ja ĝi.

'12 En minejoj uraniaj ; mortigas ardezoŝakt'. ; Arboj velkas, popoloj melkas ; radioaktivon per lakt'.

'13 Volis Hindujo havi tuj ; eblecon je eksterm'. ; Venis Kanado kvel* kamarado, ; helpis je bomba ekĝerm'.

'14 Estas nur Aŭstrie sekura ; atoma reaktor': ; Abstinenco antaŭ komenco ; lasis ĝin sen labor'.

'15 Hejtis ŝargo en Harisburgo ; truon ŝajne tro, ; likis el dresi2ta stelo ; danĝera li2kvo do.

'16 Ŝatas franca ŝtato pranci ; pri politika fort', ; izola sole stara atolo ; mortas, mize2ra sort'.

'17 Venis la vento el oriento, ; oris la sunobril', ; forpelis vintron de nia lando, ; vojaĝis mejlojn mil.

'18 Subite, sen antaŭa diveno, ; sonoris radi-alarm' ; pri nova ne konata pereoo. ; For politi2ka ĉarm'.

'19 Brulis barilo ĉe Ĉornobilo, ;
rompiĝis reaktor', ; ne plu funkciis unu
pumpilo, ; rimedo e2stis for.

'20 Malfruinformo, Soveta normo, ; pri
la akcident', ; sed same misrapi2dis
disen ; francpubliken atent'.

'21 Faris eksplodo fremdan jodon, ;
malbenan materion: ; Cin perfidos
ti2roido, ; plaĉas jodo al ĝi.

'22 Ĉu poste kultiviĝos kampo, ; ĉu
kreskos la tritik'? ; Ĉu ĝin manĝi bona
aranĝo ; aŭ baldaŭ malica komplik'?

'23 Sonas multimpona stulto ; el la
parlament'; ; "Riskograda ra2diado ;
venas nu2r per vent'."

'24 Misokazus mankoj kvazaŭ ; nur en
alia land'. ; "Ĉe ni eterne sekura
kaverno ; neniam fari2ĝus fand'."

'25 Kanceroj kreskas kaj groteska ; fetu
en uter'. ; Pro malsaĝo kaj pigromesaĝo
; venenas nin atmosfer'.

'26 Kial fekundon naskis grundo, ; kial
la frondabund'? ; Ĉu ludas hundo,
flugas hirundo ; ne pro cela profund'?
.....

'27 Ĉu vivos anstataŭ ni nur blatoj ; en
radioaktiva mond'? ; Ĉu deklaro
"Homkreo eraro" ; estos al Dio
respond'?

'28 Se havas ni dentojn, spiron, sentojn,
; ruĝan sangon en kor', ; pelu frenezan
mortokomplezon ; radioakti2van for!
.....)